Jen libro malfacile legebla, verkebla, tradukebla, recenzebla. Jen ekzemplo de Alta Literaturo. Jen en Esperanto beletra giganto, eterna Nobel-kandidato. Tiu verko pritraktas pacon kaj militon, amon kaj morton, bonon kaj malbonon. Alivorte, la ĉiamajn filozofiajn temojn. Sklavecon, holokaŭston... sed ankaŭ rezistadon. Tio estas, moralaj decidoj. Enestas dekoj da historioj ene de historioj, personaj kaj kolektivaj, multaj el ili ĉirkaŭ Triesto. Kiel la koncentrejo kaj ekstermejo en Rizejo (itale *Risiera di San Sabbia*), kie estis kruele murditaj miloj da homoj. Inter eseo kaj romano, Magris priskribas detale la okazintaĵojn kaj ties aktorojn. Kelkaj kunlaboris kun la nazioj, kelkaj ne, eĉ kiam tio signifis riski la propran vivon. Kelkaj helpis la prizonulojn, kelkaj profitis de ili, ĉu rekte, ĉu nerekte. Kion farintus ni? “Kiu ne estas senkulpa estas kulpa – la griza zono estas inventaĵo pro komforto” (p. 289).

Paco kaj justo

La du ĉefroluloj celas memorigi la venontajn generaciojn pri tiaj aferoj por atingi pli pacan kaj justan socion. Sekve, oni devas konstrui muzeon de memoro, de kruelo kaj hororo, nome muzeon de milito. Se ĝi sukcesus inkluzivi ĉiujn militilojn de la mondo, ekstere oni estus pli sekura. Per mallongaj ĉapitroj, Magris montras al ni ĉiun salonon de la muzeo laŭ fadeno, kiu interplektiĝas kun aliaj, kiel la mult-tabulaj notoj, verkitaj de ĝia iniciatinto kaj la familia itinero de Luisa Brooks, la homo, fine realiganta ĝin. Kurioze, la tuto baziĝas sur reala persono, kiu ekzistis en Triesto kaj planis tiun muzeon.

Jen postlegada pripensio: estas tiom da militaj muzeoj en la mondo, tiom da monumentoj al militemaj prodaĵoj¹ ... ĉu oni devus transformi ilin, por ke ili fariĝu memoraĵoj al paco kaj al bono?

Viŝi la paseon

Cikatroj titolis la libron la slovena tradukisto. *Senkulpe* nomis ĝin la angla eldono. *Ne procezinde* estis la originala jura esprimo en la itala titolo de Magris, kiun decidis adapti ankaŭ la dana, franca, germana, hispana, kataluna, pola kaj portugala

1 Prodaĵo = Laŭdinda heroaĵo plenumita spite al grandaj danĝeroj

versioj. Fakte, multaj estas la momentoj en la rakonto, kie opiniante, ke ne plu indas scii kaj sciigi pri sia agado, homoj klopodas forviŝi sian paseon. Siaflanke, la nederlanda kaj Esperanta tradukoj preferis klarigi al la leganto ekde la komenco, pri kio temas: *Muzeo de milito*. Ja la libro mem estas muzea kolekto de memoraĵoj.

Kial gravas daŭre esplori kaj pripensi tiujn hontindajn epizodojn de nia historio? Ĉar ni devas ne forgesi, kio okazis, kion faris la homa (ĉu vere infana?) raso. Ĉar ni ne devas alkutimiĝi. Ĉar, eble, la fumo de la kremaciejo devenas de nia interno. Ĉar honorigante la viktimojn kaj la etikajn herojn, ankoraŭ plejparte anonimajn, ni reprenas iom de la digno, perdita pro la fieco de la murdistoj – ankaŭ plejparte anonimaj, ankoraŭ. En Hispanio oni tion nomas *historia memoro*.

La libro de Claudio Magris faras grandan kaj altkvalitan kontribuon tiucele. La majstra traduko de Carlo Minnaja ebligas, ke ĉiuj konatiĝu kun ĝi en racia lingvo. Kaj li aldonis pli ol 200 utilajn piednotojn por kompreni kaj



ĝui la erudicion de la aŭtoro. La reviziado de Federico Gobbo perfekte enŝoviĝas en profesian eldonon. Kaj li aldonis valoran prezenton de la libro ĝuste por ni, esperantistoj, kiuj ne malproksimas de pacismaj utopioj. Fine, la bela kovrilo de la FEL-eldono samas al tiu originala, pri kio respondecas Valeria Miele.

Beletra defio

Post tralego de dudeko da recenzoj en pluraj lingvoj, ŝajnas, ke kelkaj kritikistoj trovis la verkon tro ambicia kaj longa, foje ankaŭ iom konfuza, ne malofte kun troa uzo de kliŝoj. Dume, la plimulto el ili taksis ĝin elstara, unika, poezia kaj fascina, enciklopedia (ne hazarde ĉiu recenzo fokusiĝas pri malsama epizodo kaj citas apartan frazon), pinto de

la eŭropa humanismo. Interalie, ĝi premiigis kiel la plej bona libro de la jaro 2016 de la itala ĵurnalo *Il Corriere della Sera*.

Resume, rekomendinda libro por postulema leganto, preta akcepti beletran defion kaj dediĉi sufiĉe da tempo kaj energio al malkovro de pensiga juvelo. Ĝi meritos la penadon.

Javier Alcalde
el Monato 2019/12

Claudio Magris: La muzeo de milito. El la itala tradukis Carlo Minnaja. Redaktis Federico Gobbo. Eldonis Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2019. 296 paĝoj, kudre bindita. ISBN 978-9077-06662-1.

Prezo ĉe FEL: 35 eŭroj plus afranko.

HOMARANISMO

INTERNACIA TAGO POR ELIMINO DE RASA DISKRIMINACIO: UEA-ILEI-MESAĜO

La 21-a de marto estas la Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio, ĉiujara aranĝo kiu atentigas pri la plago de rasismo. Ĉi-jare la Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio fokusiĝas je la duonvoja pritakso de la Internacia Jardeko por Homoj de Afrika Deveno (2015-2025), kiun prizorgas la Konsilio pri Homaj Rajtoj, en Ĝenevo. La pritakso resumos la jaman progreson kaj vokos al plia agado.

Laŭ Unuiĝintaj Nacioj, “Proksimume 200 milionoj da homoj, kiuj identigas sin kiel afrikdevenaj, loĝas en la Amerikoj. Multaj pliaj milionoj loĝas en aliaj mondopartoj, ekster la afrika kontinento.” Notas Unuiĝintaj Nacioj: “Ĉu kiel posteuloj de viktimoj de la transatlantika sklavokomercio, ĉu kiel pli lastatempaj enmigrintoj, afrikdevenaj personoj estas inter la plej malriĉaj kaj plej marĝenigitaj grupoj. Ili ankoraŭ havas limigitan aliron al bonkvalita edukado, sanservoj, loĝejoj kaj socia asekuro, kaj ilia nivelo de politika partopreno estas ofte malalta. Krome, afrikdevenaj personoj ne malofte suferas pro multflanka diskriminacio surbaze de aĝo, sekso, lingvo, religio, politika opinio, socia deveno, posedrajto, handikapo, naskiĝo, aŭ alia statuso.”

Universala Esperanto-Asocio, laŭ sia statuto, same ILEI, estas neŝanceble kontraŭ ĉiuj formoj de diskriminacio, inkluzive de rasa diskriminacio. Fundamenta al ĝia kredo estas vizio de monda komunumo, kiu vivas en harmonio kaj reciproka kompreniĝo. La rapida ekspansio de la

Internacia Lingvo Esperanto en lastaj jaroj atestas pri la potenco de tiu vizio.

Laŭ la fondinto de Esperanto kaj ties movado por la paco, D-ro L. L. Zamenhof, en mesaĝo al la Universala Kongreso de la Rasoj en Londono, antaŭ pli ol cent jaroj, “La konfliktoj kiuj troviĝas inter la diversaj rasoj kaj popoloj estas la plej granda malbono kiu afliktas la homaron.” Tiu malbono de rasismo daŭre vivas, bredante malamon kaj nutrante malegalecon. Ni alvokas al homoj ĉie troviĝantaj, ke ili kuniĝu por konkeri tiun malbonon per la spirito de kompreniĝo, inkluzive de lingva kompreniĝo, inter popoloj kaj etnoj tra la tuta mondo.

Ni citu Mandela: “Edukado estas la plej potenca armilo, kiun oni povas uzi por ŝanĝi la mondon.” Ni instruistoj konstatas, ke la tasko estas nia. Kuraĝe antaŭen, karaj gekolegoj!

www.ilei.info



VIVO DE ZAMENHOF

HOMARANO – ĉapitro 7

LID VAN DE MENSHEID – hoofdstuk 7

Ekstere la Bulonja Kongreso estis antaŭ ĉio festo propaganda. Tamen pri vastiĝo de la lingvo, la kunsidoj oficialaj okazigis interesan diskutadon. Flue kaj facile sonis argumentoj kaj respondoj de la parolantoj.

Sur neŭtrala fundamento ĉiu sentis sin egala kaj libera. Kiel ĉiujn kongresanojn tio tre impresis Zamenhof. Reveninte Varsovion, li kunportis feliĉegan sperton, ne nur lingvan, sed moralan:

“Kiu aŭdis la multnombrajn parolojn kaj diskutojn, kiu vidis tiun plenan senĝenecon kaj kortuŝantan fratecon inter ĉiuj partoprenantoj de la kongreso, tiu al si mem ne kredis, ke ĉiuj tiuj homoj ankoraŭ hieraŭ estis tute fremdaj unuj al la aliaj, ke ilin unuigis nur neŭtrala lingvo (...), ke ĝia facila lernado faris miraklon, kaj deŝirante neniun de lia natura patrujo, lingvo, aŭ religiano, donis al homoj de plej diversaj gentoj kaj religioj la eblon vivi inter si en la plej paca kaj sincera frateco.” [1]

La revo, li pensis, estas do plenumbla, kaj efektive la lerno de mondlingvo montriĝis unua paŝo plej efika.

Dum vintro la proksimaj faktoj alportis sovaĝan kontraston, elokventan per si mem. Rusa kaj japana imperioj militis inter si. Dume la popoloj en Ruslando komencis ribeli kontraŭ carisma regado. Amaso da malriĉaj laboristoj antaŭ la palaco peterburga petis pri elementaj rajtoj politikaj. La gvardianoj sur ĉevaloj ricevis ordonon ekpafi. Viroj, infanoj, virinoj ruliĝis sur neĝo sangante.

En okcidentaj kaj sudaj provincoj la ribelo fariĝis jam nacia. Letoj, Ukrainoj, Kaŭkazo ekbatalis por libereco patruja. Por repremi la danĝeron, la registoj uzis la metodon tradician: “Divide ut imperes”. Konkurencon inter gentoj ili tuj profitis, kaj akriĝis la disputojn per agentoj specialaj. Tiel nomita “Nigra mano” estis fako tiucela ĉe polico. Al diversaj urboj ĝi eksendis bandojn, kaj incitis al pogromoj. En Varsovio polaj socialistoj tion malpermesis per armita junularo gardanta ĉiujn stratojn. Teruro ja minacis. En litva lando kaj Odeso estis pli facile. Tie loĝas la Hebreoj en tre grandaj nombroj. Frakaso de l’ butikoj, rabado kaj buĉado sonis baldaŭ. En Kaŭkazo okazis same inter gentoj alinomaj, Rusoj kaj Georgoj, Tataroj kaj Armenoj.

Abomena vidaĵo. Kiel malsama je bulonja! Korpremite, Zamenhof sentis sian devon fari novan elpaŝon. La gentoj lernu sin defendi kontraŭ tiaj ruzoj. Ili lernu liberiĝi de malamo, evitante senutilan konkuradon. Kion li proponis al Hebreoj sub titolo “Hilelismo”, li decidis igi taŭga ĝenerale.

Naar buiten toe was het congres in Boulogne vooral een propagandafeest. Toch brachten de officiële vergaderingen rond het thema van de verspreiding van de taal een interessante discussie teweeg. Vlot en gemakkelijk weerklonken de argumenten en reacties van de sprekers. Op een neutraal fundament voelde iedereen zich gelijk en vrij. Net zoals op alle congresgangers maakte dit ook indruk op Zamenhof. Na zijn terugkeer in Warschau hield hij er een heel weldoende ervaring aan over, niet alleen met betrekking tot de taal maar ook moreel:

“Wie de talrijke tussenkomsten en discussies hoorde, wie die absolute ongedwongenheid en hartverwarmende broederlijkheid tussen de congresdeelnemers zag, kon zelf niet geloven dat al die mensen gisteren nog volkomen vreemden waren voor elkaar, dat louter een neutrale taal hen bij elkaar bracht..., dat het gemak om ze te leren een mirakel teweegbracht, en dat de taal hen – zonder dat ze afstand moesten doen van hun natuurlijke vaderland, taal of geloofsgemeenschap – de mogelijkheid gaf om samen te leven in de meest vredevolle en oprechte broederlijkheid.” [1]

De droom, dacht hij, is dus realiseerbaar, en het leren van een wereldtaal bleek de meest doeltreffende eerste stap.

Tijdens de winter vormden de nakende gebeurtenissen daarmee een fel contrast. Het Russische en het Japanse rijk vochten een oorlog uit. Onderwijl begon in Rusland het volk in opstand te komen tegen de heerschappij van de tsaren. Een massa behoeftige arbeiders eiste voor het paleis in Sint-Petersburg elementaire politieke rechten op. De garde te paard kreeg het bevel om te schieten. Mannen, kinderen en vrouwen rolden bloedend in de sneeuw.

In de westelijke en zuidelijke provincies kreeg de opstand een nationalistisch karakter. Letten, Oekraïners, Kaukasiërs vochten voor vaderlandse vrijheid. Om het gevaar te onderdrukken, maakten de heersers gebruik van een aloude methode: “Divide ut imperes” [Verdeel en heers]. Zij maakten meteen misbruik van de rivaliteit tussen de volksgemeenschappen en dreven de twisten op de spits door het inzetten van speciale agenten. De zogenaamde “Zwarte hand” was een daartoe speciaal opgerichte politieafdeling. Naar verschillende steden stuurde zij bendes uit, en spoorde hen aan om pogroms te ontketenen. In Warschau verhinderden Poolse socialistten dit door gewapende jongeren alle straten te laten bewaken. Maar terreur was op til. In het Litouwse land en Odessa was het gemakkelijker. Daar woonden de Hebreëen in groten getale. Weldra zou het stukslaan van winkels, plunderingen en beroving weer te horen zijn. In de Kaukasus gebeurde iets gelijkaardigs



«...hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bologne-sur-Mer kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.»

Ludwik Zamenhof

Al ĉiuj homoj li sin turnos nun egale kiugentaj. Krom nacianoj, ili devus senti sin homaranoj. Tial “Homaranismo” estis la titolo de la broŝureto, presita sen aŭtora nomo en Peterburgo 1906. [2] Ĝi enhavis novan instruon pri la rilatoj inter hejmo, gento kaj homaro. Deklaro el dek du paragrafoj formis la kredaron. Antaŭparolo mallonga ĝin klarigis:

“La homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiano, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco, kaj justeco.”

La antaŭparolo aludis la sperton de l’ bulonja kongreso, kiel pruvon, ke tia frateco estas ebla. Ĝi tamen atentigis, ke oni ne devas intermiksi homaranismon kun esperantismo:

“Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter si, sed ne identaj. Oni povas esti bonega esperantisto, kaj tamen kontraŭulo de la homaranismo.”

Nur tial Zamenhof ne publike subskribis la libreton, ĉar li volis eviti konfuzon. Tiu ŝajna malkuraĝo lin tre suferigis. En 1912 li publike formetis de si ĉiun oficialan rolon en la aferoj de Esperanto por gajni plenan liberecon, kaj de poste li metis sian nomon sur la novaj eldonoj de l’ broŝuro.

En Orienta Eŭropo ekzistas inter gentoj du ĉefaj elementoj de malsamo kaj malamo: lingvo kaj religio. Poloj estas katolikaj, Hebreoj izraelanaj; Letoj estas luteranaj, Rusoj ortodoksaj; Armenoj estas kristanaj, Tataroj mahometanaj. La diferencon gravigas ne nur aparta parolo, sed konkura kredo. En literaturo kaj eklezio koncentriĝas la naciaj sentoj. Tial en punktaro Zamenhofa staras du ĉefaj partoj: unu lingva-politika, alia religia.

En sia hejma vivado ĉiu parolu sian gepatran lingvon laŭplaĉe, sed li ne trudu ĝin al homoj aligentaj, por ne ĝeni aŭ ofendi ilin. En okazo de kunveno li uzu neŭtralan esprimilon, kiel Esperanto. Kun siaj samkredantoj li sekvu tiujn religiajn morojn, kiujn li deziras tradicie aŭ elekte, sed kun homoj alikredaj li konduku nur laŭ tiu ĉi principo: “Agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi”.

Same kiel, ĉe parola fako, internacia lingvo prezentas

tussen andere volksgemeenschappen, tussen Russen en Georgiërs, tussen Tataren en Armeniërs.

Een afschuwelijke aanblik. Wat een contrast met Boulogne! Zamenhof was er het hart van in en voelde het als zijn plicht om een nieuwe stap te zetten. Mensen moesten leren om zich te verdedigen tegen die listen. Zij moesten leren om zich vrij te maken van die haat, door die nutteloze rivaliteit te vermijden. Hetgeen hij aan de Hebreëen had voorgesteld onder de titel “Hilelismo”, zou hij nu ten dienste stellen van het grote publiek.

Hij zou zich nu richten tot alle mensen, ongeacht hun afkomst. Behalve lid van een bepaalde natie, moesten ze zich nu ook *homarano* [lid van de mensheid] voelen. “Homaranismo” was dan ook de titel van het boekje dat in 1906 in Sint-Petersburg werd gedrukt zonder auteursnaam. [2] Het bevatte een nieuwe leer over het verband tussen thuis, volksgemeenschap en mensheid. Een verklaring bestaande uit tien paragrafen vormde de kern van de leer. Een kort voorwoord maakte het duidelijk:

“Het homaranisme is een leer die mensen – zonder dat ze afstand moeten doen van hun natuurlijke vaderland, hun taal of hun geloofsgemeenschap – de mogelijkheid geeft om elk soort onwaarheid of tegenspraak in hun etnisch-godsdienstige principes te vermijden en om samen te leven met mensen van elke taal en godsdienst op een neutraal-menselijke basis, gegrond op principes van onderlinge broederlijkheid, gelijkwaardigheid en rechtvaardigheid.”

Het voorwoord zinspeelde op de ervaringen tijdens het congres in Boulogne, als het bewijs dat een dergelijke broederlijkheid mogelijk is. Maar het onderstreepte wel dat men homaranisme en esperantisme niet door elkaar mocht halen:

“Beide ideeën leunen nauw bij elkaar aan, maar zijn niet identiek. Men kan een uitmuntend esperantist zijn en toch tegenstander van het homaranisme.”

Dat was de enige reden waarom Zamenhof de brochure niet ondertekende: hij wou verwarring vermijden. Die ogenschijnlijke kleinmoedigheid kostte hem veel moeite. In 1912 deed hij publiek afstand van elke officiële functie in verband met Esperanto om zo volledig vrij te kunnen zijn, en van dan af zette hij zijn naam onder elke nieuwe uitgave van de brochure.

In Oost-Europa zijn er tussen volksgemeenschappen twee hoofdelementen die verschil en haat verklaren: taal en godsdienst. Polen zijn katholiek, Hebreëen israëlitisch; Letten zijn luthers, Russen orthodox; Armeniërs zijn christen, Tataren moslim. Niet alleen de verschillende talen maar dus ook de rivaliserende godsdiensten verscherpen die tegenstellingen. In literatuur en godsdienst concentreren zich de nationale gevoelens. Daarom bestaat het overzicht van Zamenhofs principes uit twee hoofddelen: een taalpolitiek en een godsdienstig.

Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio vivu la celo kaj la interna ideo de la esperantismo, vivu la frateco de la popoloj, vivu ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj, vivu, kresku kaj floru la verda standardo!

Zamenhof



neŭtralan fundamenton por senĝena renkontiĝo kaj fratiĝo, tiel ankaŭ io simila devus ekzisti sur la kampo religia. Sub la nomo “Dio” aŭ sub alia la homaranoj komprenu tiun Forton neklarigeblan, sentatan de multaj kiel kaŭzo de kaŭzoj en la mondo materia kaj morala, aŭ de kelkaj nur en la morala. Neniam ili malamu, moku aŭ persekutu iun pro tio, ke lia kredo pri tiu Forto estas alia ol tiu, kiun ili preferas. Same estas kruda barbareco riproĉi iun ajn pri lia lingvo aŭ deveno. Ili konsciu, ke la veraj ordonoj religiaj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo de konscienco, kaj ke la ĉefa estas la estimo kaj helpemo reciprokaj. La ceteron en religio ili rigardu kiel aldonojn, laŭ unu, devigajn por li diroj de Dio, laŭ alia, komentariojn donitajn de l’ grandaj instruintoj de la homaro, laŭ tria, miksaĵon de instruoj kaj legendoj aŭ moroj starigitaj de homoj. Ĉefe tiuj moroj akriĝas diferencojn.

Tra vitroj diverskoloraj la homoj vidas unu saman Forton. Liberaj povas esti predikoj propagandaj. Sed neniam homaranoj “trudu” la gentan koloron de sia vidaĵo al ceteraj. Filozofe la instruitaj personoj jam ofte toleras, se ne respektas, la malsamajn kredojn de aliaj inteligentuloj; sed pri kutimoj la konflikto estas multe pli grava.

Tial Zamenhof insistis pri neŭtrala fundamento mora, ne nur ideo. Ĉiutaga vivado en Eŭropo orienta montras la neceson de vidpunkto praktika. La faktoj ĝin postulas. Saluto aŭ ne saluto je ŝtonkrucoj ĉe publikaj vojoj. Oficiala trudo de Sabato aŭ Dimanĉo kiel deviga festotago. Havo aŭ nehavo de longa barbo. Ĵuro sur Biblio aŭ per levo de la mano. Atesto kun ĉapo aŭ sen ĉapo sur la kapo. Ĉio simila povas ŝajni tre ridinda okcidente. Ĝi tamen kaŭzis oriente batalojn dum centjaro. Ĝi tuj ĵetas sur la lipojn nomon gentan, kvazaŭ insulton.

Eĉ deklaroj estas gravaj, ne nur moroj kaj ideoj. En Galicio, juda lingvo estis leĝe nemontrebla kiel la gepatra en deklaroj oficialaj. Hebreoj devis enskribiĝi anoncanta ĉu polan, ĉu germanan, aŭ ukrainan lingvon kiel sia. Nur per religioj oni povis kalkuli la diversgentanojn: Izraelanoj = Hebreoj, Romaj katolikoj = Poloj, Grekaj katolikoj = Ukrainoj, Protestantoj = Germanoj. Eĉ se ili forlasis jam de longe la prapatran kredon, ĉiuj sin enskribis laŭ la genta religio, pro la nombro. Vidpunkto nur nacia kun celo statistika-politika!

Tial Zamenhof preparis neŭtralan fundamenton ankaŭ per zorgo rimarkinda pri deklaroj: Homaranoj kutimiĝu je

Thuis gebruikt iedereen zijn moedertaal naar believen, maar hij dringt ze niet op aan mensen van een andere volksgemeenschap, teneinde ze niet te hinderen of te beledigen. Tijdens bijeenkomsten gebruikt hij een neutraal uitdrukkingmiddel, zoals Esperanto. Met zijn geloofsgenoten volgt hij de godsdienstige gebruiken ofwel zoals de traditie het wil, ofwel zoals hij het zelf verkiest, maar tegenover andersgelovigen gedraagt hij zich volgens het volgende principe: “Ga met anderen om zoals je wil dat anderen met jou omgaan”.

Net zoals een internationale taal op het gebied van gesproken communicatie een neutraal fundament vormt voor ongedwongen ontmoetingen en verbroedering, zou er ook iets dergelijks moeten bestaan op het gebied van religie. Onder de naam “God” of onder een andere naam zouden *homaranoj* die onverklaarbare Kracht moeten verstaan, die door velen aanvoeld wordt als de oorzaak der oorzaken in de materiële en geestelijke wereld, of door enkelen alleen in de geestelijke wereld. Nooit mogen zij iemand haten, bespotten of vervolgen omdat zijn geloof in die Kracht anders is dan wat hijzelf verkiest. Ook getuigt het van onbeschaafde barbaarsheid om wie dan ook zijn taal of afkomst kwalijk te nemen. Men moet er zich van bewust zijn dat de echte godsdienstige voorschriften in het hart van elk mens aanwezig zijn in de vorm van het geweten, en dat het respect voor elkaar en onderlinge hulp het belangrijkste zijn. De andere voorschriften moeten zij zien als aanvullingen, volgens sommigen dwingend omdat ze gebaseerd zijn op het woord van God, volgens andere commentaren ingegeven door de grote leermeesters van de mensheid en volgens nog anderen een geheel van voorschriften en legendes of gebruiken vastgelegd door mensen. Vooral die gebruiken verscherpen de tegenstellingen.

Door veelkleurige glazen zien mensen allemaal dezelfde Kracht. Propagandistische preken mag men doen. Maar nooit mogen *homaranoj* de etnische kleur van hun zienswijze “opdringen” aan de anderen. Vanuit filosofisch standpunt tolereren, dan wel respecteren ontwikkelde mensen nu al de verschillende geloofsovertuigingen van andere intellectuelen; maar over gebruiken gaat het conflict dieper.

Daarom drong Zamenhof ook aan op een neutraal fundament in verband met de gebruiken, niet alleen een ideeënfundament. Het dagelijks leven in Oost-Europa toont de noodzaak aan van een praktische invalshoek. De feiten vereisen het. Groeten of niet groeten bij kruisbeelden langs openbare wegen. Het officieel opleggen van zaterdag of zondag als verplichte feestdag. Het dragen of niet dragen van een lange baard. Zweren op de bijbel of door handopsteking. Getuigenis afleggen met of zonder hoofddeksele. Al dergelijke zaken kunnen belachelijk lijken in het Westen. In het Oosten echter lagen deze gebruiken aan de basis van een eeuw strijd. Elk gebruik associeerde men met een of andere volksgemeenschap, een scheldwoord als het ware.

Maar ook officiële documenten zijn belangrijk, niet en-



sincero. Sur lasta paĝo de l' broŝuro staris preta respondaro por laŭvolaj aliĝantoj. Jenaj fakoj apartiĝas: hejmo, patrujo, gento devena, lingvo gepatra, lingvo persona, religio laŭkreda. Nur tia demando ebligus ĉiun diri plenan veron, ne perfidante suferantajn samgentanojn.

Gepatra lingvo Zamenhofa estis rusa, persona estis pola. Lia gento estis la hebrea, lia religio liberakreda. Tion li povus ja konfesi sur enskribilo homarana. Sed, se li metus tion sur pasporton imperian, li estus kalkulata tuj en unu partio nacia. Kun Rusoj, premantoj de Polujo, aŭ kun Poloj kontraŭ la Hebreoj.

Tial homarana formularo proponas ja modelon tre praktikan por estontaj demandoj oficialaj de regna recenzado. Same preskaŭ ĉiuj dek du punktoj de l' broŝuro povas celi du efikojn. Unuflanke tuja gvido al konduto individua. Aliflanke rekta montro por leĝaro pli justa inter homoj. Dek kvar principoj noblaj de Wilson nur montris al regantaj diplomatoj tion, kion ili devus fari. Se falus la konsento, la principoj falus kune. Ŝiraĵoj de l' papero disflugus sur la tablo verda. Nacioj ilin kaptus, kaj ĉiu svingus sian pecon por justigi novan ekbatalon.

Dume, programo Zamenhofa povas tuj gvidi homojn, kaj influi poste leĝfarantojn. Liaj dek du punktoj povas semi nur pacigon: Rigardu la homaron kiel unu familion. Tiu idealo regu viajn agojn. Juĝu ian homon ne laŭ gento, sed laŭ agoj. Lando apartenas, ne al unu gento, sed al ĉiuj la loĝantoj. Ne trudu vian gentan lingvon, nek la kredon, al ceteraj homoj. Metu la nomon "homo" super la naciaj.

keln bruken en idee. In Galicie mocht de Joodse taal volgens de wet niet gebruikt worden als moedertaal in officiële documenten. Hebreeën moesten zich inschrijven als hetzij Pools-, Duits- of Oekraïenssprekend. Alleen op basis van hun godsdienst kon men de verschillende leden van de volksgemeenschappen tellen: Israëlieten = Hebreeën, rooms-katholieken = Polen, Grieks-katholieken = Oekraïners, protestanten = Duitsers. Zelfs zij die al lang voordien afstand namen van hun voorvaderlijk geloof, schreven zich in voor de telling onder de godsdienst van hun volksgemeenschap. Een louter volksgemeenschappelijk standpunt met een politiek-statistisch doel!

Om die reden voorzag Zamenhof een neutraal fundament met een opmerkelijke aandacht voor de officiële documenten: *homaranoj* moesten het gewoon worden om eerlijk te zijn. Op de laatste pagina van de brochure stond een formulier voor vrijwillige intekenaars. Er waren afzonderlijke rubrieken voor thuis, vaderland, afkomst, moedertaal, spreektaal, godsdienst. Enkel een dergelijk formulier zou het iedereen mogelijk maken om de waarheid te zeggen, zonder zijn lijdende volksgenoten te verraden.

Zamenhofs moedertaal was het Russisch, zijn gebruikstaal was het Pools. Hij behoorde tot de Hebreeuwse volksgemeenschap, en hij was qua godsdienst een agnost. Dat kon hij aangeven op het antwoordformulier. Maar als hij dit op zijn officieel paspoort zou laten noteren, dan zou hij direct tot een bepaalde volksgemeenschap worden gerekend. Tot de Russen, onderdrukkers van de Polen, of tot de Polen, tegenstanders van de Hebreeën.

Daarom suggereerde het homarano-antwoordformulier een erg praktisch model voor toekomstige officiële volkstellingsformulieren. Op dezelfde manier kunnen nagenoeg alle twaalf punten uit de brochure twee doelstellingen nastreven. Enerzijds een duidelijke leidraad zijn voor het persoonlijk gedrag. Anderzijds de richting aangeven naar een rechtvaardiger wetgeving. De veertien edele principes van Wilson [3] toonde enkel de heersende diplomaten wat zij zouden moeten doen. Als de consensus er niet meer was, zouden de principes mee teloorgaan. Het versnipperde papier zou uiteenwaaien op de onderhandelingstafel. Naties zouden het grijpen, en elkeen zou met zijn stukje zwaaien om een nieuwe aanval te verantwoorden.

Het programma van Zamenhof daarentegen kan mensen direct een richting wijzen en daarna wetgevers beïnvloeden. Zijn twaalf punten kunnen alleen maar tot verzoening leiden: aanzie de mensheid als één familie. Beoordeel een mens niet op basis van zijn afkomst, maar op basis van zijn daden. Een land behoort niet toe aan een bepaalde volksgemeenschap maar aan al zijn inwoners. Dring de taal van jouw gemeenschap of je geloof niet op aan de anderen. Plaats de naam "mens" boven zijn afkomst. Patriotisme betekent alleen maar ten dienste staan van de regionale gemeenschap van mensenbroeders, het betekent nooit het haten van de anderen. Taal is alleen maar een doel, geen middel. Gebruik een neutrale taal met mensen van een

Patriotismo estu nur servado al regiona komunumo de homfratoj, neniam malamo al ceteraj. Lingvo estu ne celo, nur rimedo. Uzu neŭtralan lingvon kun aligentuloj. Via kredo religia estu ne hereda, sed sincera. Kun alikredaj homoj agu laŭ etiko neŭtrale-homa kaj helpema. Kun homaranoj vi kulturu sentojn unuigajn, ne disigajn.

En la unua broŝuro Zamenhof proponis, ke homaranoj nomu ĉiujn landojn per neŭtralaj negentaj vortoj, kiel Kanado, Svisujo, Peruo, Belgujo, aŭ per aldono de sufikso -io al ĉefurbo, kiel Berlinio, Peterburgio, Konstantinoplio. Poste li forigis tiun paragrafon kiel nepraktikan. Ankaŭ li fortranĉis multon el la lasta punkto. En la komenco li proponis eĉ starigon de templo homarana en ĉiu urbo. Aliĝintoj devus:

“(...) frate kunvenadi tie kun homaranoj de aliaj religioj, ellabori kune kun ili morojn kaj festojn neŭtrale-homajn, kaj tiamaniere kunhelpi al la iom-post-ioma ellaboriĝo de filozofie pura, sed samtempe bela, poezia, kaj varma, vivo-reguliga religio komune-homa (...). En la templo homarana oni aŭskultados la verkojn de la grandaj instruintoj de la homaro pri la vivo kaj morto kaj pri la rilato de nia “mi” al la universo kaj al la eterneco, filozofie-etikajn interparoladojn, altigajn kaj nobligajn himnojn, k.t.p. Ĉi tiu templo devas edukadi la junularon kiel batalantojn por la vero, bono, justeco kaj ĉiuhoma frateco, kaj ellaboradi en ili amon al honesta laboro kaj abomenon por frazisteco kaj por ĉiuj malnoblaj malvirtoj; tiu ĉi templo devas donadi spiritan ripozon al la maljunuloj, konsolon al la suferantoj, doni la eblon senŝarĝigi sian konsciencon, k.t.p.”

Pli malfrue Zamenhof nur lasis la proponon pri fondiĝo de tia komunumo inter libercredanoj, kiuj ne trovis sian spiritkontentigon en preĝejoj ekzistantaj. Laŭ lia celo kaj espero la homaranoj ĉiam plimultiĝos en la mondo. Konstanta komunikigado ilin edukos sur la bazo de neŭtrala lingvo, neŭtralaj moroj kaj principoj religiaj. Rondo kreskos. Ondoj fluos. Influo disvastiĝos. Iom post iom, sen rompado, sen ofendo, tute nature, ĉiuj homoj kunfandiĝos en unu granda homa popolo de popoloj.

Al tiu revo li fordonis tutan sian vivon.

[1] El la broŝureto “Homaranismo” de Zamenhof, eldonita sen subskribo, Peterburgo 1906.

[2] Ĉe D.P. Veisbrut, Troickij prospekt, n-ro 14.

andere afkomst. Jouw geloof moet niet erfelijk zijn, maar vooral oprecht. Ga om met andersgelovigen op basis van een ethiek van neutraal-menselijkheid en van hulpvaardigheid. Koester met *homaranoj* verbindende gevoelens, geen uiteendrijvende.

In de eerste brochure stelde Zamenhof voor dat *homaranoj* alle landen een neutrale, niet etnisch gekleurde naam zouden geven, zoals Canada, Zwitserland, Peru, België of door toevoeging van het achtervoegsel “-io” aan de naam van de hoofdstad, zoals Berlijn*io*, Petersburg*io*, Constantinop*io*. Daarna verwijderde hij die alinea wegens niet praktisch. Ook schraptte hij veel uit het laatste punt. Aanvankelijk stelde hij zelfs de oprichting voor van een *homarano*-tempel in elke stad. Intekenaars moesten:

“... er broederlijk samenkomen met homaranoj van andere godsdiensten, samen met hen neutraal-menselijke gebruiken en feesten ontwikkelen, en op die manier meehelpen aan het stap voor stap uitwerken van een filosofisch zuivere, maar terzelfder tijd ook mooie, poëtische en warme, algemeen-menselijke godsdienst die het leven van mensen zou kunnen begeleiden... In de homarano-tempel zal men luisteren naar de voorschriften van de grote leermeesters van de mensheid over leven en dood en over het verband tussen “ik” en het universum en de eeuwigheid, naar ethisch-filosofische gesprekken, verheffende en veredelende hymnes, enz... Deze tempel moet de jeugd opvoeden als strijders voor het ware, het goede, het rechtvaardige en de algemeen-menselijke broederlijkheid, en bij hen liefde voor eerlijke arbeid opwekken en afkeer voor mooipraters en voor alle andere boosaardige ondeugden; deze tempel moet geestelijke rust geven aan de ouderen, troost aan de lijdenden, mensen de mogelijkheid geven om hun geweten te verlichten, enz...”

Later behield Zamenhof alleen maar het voorstel om een dergelijke gemeenschap van agnosten op te richten, die geen geestelijke voldoening vinden in de bestaande bidplaatsen. Het was zijn doel en hoop dat de *homaranoj* almaar talrijker zouden worden in de wereld. Een voortdurende communicatie zou hen opvoeden op basis van een neutrale taal, neutrale gebruiken en neutrale godsdienstige principes. De kringen zouden aangroeien. Golven zouden aanzwellen. Invloed zou zich verspreiden. Beetje bij beetje, zonder onenigheid, zonder belediging, op geheel natuurlijke wijze, zouden alle mensen zich verenigen in één volk van volkeren.

Voor die droom gaf hij zijn hele leven.

[1] Uit de brochure “Homaranisme” van Zamenhof, uitgegeven zonder auteursnaam, Sint-Petersburg 1906.

[2] Bij D.P. Veisbrut, Troickij prospekt, n-ro 14.

[3] 14 puntenplan van Wilson.

BENELUKSA KONGRESO EN CHARLEROI

okazos 17 - 20 septembro 2020

Ni denove planas diversnivelejn kursojn, altnivelejn prelegojn, prezentojn, libroservon de FEL kaj Eldonejo Libera, ekskursoj ktp. La luksa kongresejo troviĝas tuj apud la stacidomo de Charleroi Sud; ege praktikas tio!

Plentempe, de ĵaŭdo ĝis dimanĉo inkl. loĝado kaj manĝoj: 235 EUR. Unutaga partopreno kun tagmanĝo kaj vespermanĝo: 50 EUR. Eblas partatempe partopreni. Diversaj ebloj kaj aldonoj aperas en la retejo. Bonvenon!



Andere nuttige adressen

Vlaamse Esperantobond / Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169, BE- 2060 Antwerpen, tel. 03 234 34 00
info@fel.esperanto.be, www.esperanto.be

Belga Esperanto-Federacio (BEF): Kristin Tytgat, kristin.tytgat@skynet.be

ILEI-Belgio (Esperanto-leraars): Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, tel.: 0486 36 23 65, flandrio@hotmail.com

Verdaj Skoltoj

p/a Valère Doumont, Rue des Champs, 3 5060 Sambreville, tel.: 071 165 395 kaj 0485 517 552; info@verdajskoltoj.net - www.verdajskoltoj.net

Association pour l'Espéranto,

p/a Jean-Pol Sparenberg, Ruelle de Thuin 20, BE-6540 Lobbes, tel.: 0475 27 23 19, jpsparenberg@gmail.com

Esperantista Brusela Grupo vzw (EBG) sekretario: p/a Yves De Keyzer, Perkstraat 78, BE-1630 Linkebeek tel.: 0498 04 00 95; sekretario@esperantobruselo.org - www.esperantobruselo.org/nl
Françoise Pellegrin, Eiklaan 14, BE-1640 Sint-Genesius-Rode

Esperanto Nederland, sekretaris, Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, tel.: +31 (0)50 5718842
sekretario@esperanto-nederland.nl
www.esperanto-nederland.nl/groepen

Hoofdkantoor van de Esperanto Wereldvereniging/Centra Officejo de UEA Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, tel.: +31(0)104 361 044, uea@co.uea.org - www.uea.org

Bestuursleden van FEL

Voorzitter: Ivo Vercammen
Ondervoorzitter: Marc Cuffez
Secretaris: Ben Indesteghe
Penningmeester: Ella Strug
Bestuursleden: Piet Glorieux, Nicky Janssen, Eddy Van den Bosch en Johan Van Eenoo

Contactadressen in Vlaanderen

www.esperanto.be/groepen

ANTWERPEN

Esperanto-Antwerpen, p/a Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen, tel.: 03 234 34 00, esperanto-antwerpen@esperanto.be
La Verda Stelo: Ella Strug (voorzitter)

BRUGGE

Paco kaj justeco, Heidi Goes, Assebroeklaan 2, BE-8310 Brugge, tel.: 050 67 51 78, heidi.goes@gmail.com

GENT

La Progreso, Katja Lödör, Peter Benoîtlaan 117, BE-9050 Gentbrugge, tel.: 09 230 16 77, gent@esperanto.be

KALMTHOUT

La Erikejo, Mireille Storms, Douglaslaan 14, BE-2950 Kapellen, tel.: 03 666 83 19, mireillestorms@hotmail.com

KORTRIJK

La Konkordo, Piet Glorieux, Pastoor Blanckestraat 8 bus 0201, BE-8610 Kortemark, tel.: 051 62 39 28, piet.glorieux@gmail.com, Jean-Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, BE-8500 Kortrijk, tel.: 056 20 07 96, esperantokortrijk@hotmail.com

LEUVEN

Esperanto 3000, Ivo Schenkel, Karekietenlaan 14, BE-3010 Kessel-Lo, tel.: 016 89 04 80 kaj 0486 39 28 02 ivo.schenkel@telenet.be

LIMBURG

Limburgse Esperantovereniging
Henri Schutters, Panhovenstraat 10, BE-3930 Peer, tel.: 011 63 55 92, henri.schutters@skynet.be

OOSTENDE

La Konko, Anne Brabant, anne.brabant@telenet.be
Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende, tel.: 0486 36 23 65, flandrio@hotmail.be

ROESLARE / TIELT zie KORTRIJK

TIENEN

Esperanto Numismatiek Vereniging (ENA)
Info: Bert Boon, Merelhof 8, BE-3300 Tienen, tel. en fax: 0472 73 48 30 bert.boon@skynet.be

TURNHOUT

Maria Dom, Tuinbouwstraat 14, BE-2300 Turnhout, tel.: 014 41 72 92, de.groot-dom@telenet.be

www.esperanto.be/horizontaal

Giften vanaf 40,00 euro aan FEL komen in aanmerking voor belastingvermindering